



NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor - MUDr. Josef Hradil, 295 01 Mnichovo Hradiště č. 718

Cena: dobrovolný příspěvek

Povolil ONV Mladá Boleslav, odbor kultury čj. 47/87-403/16

---

Marto 1988

Numero 1 Číslo

Březen 1988

---

### NOVA JARKOLEKTO

Estimataj legantoj,

vi prenas en manon unuan numeron de la nova jarkolekto de nia bulteno kun miksitaj sentoj kaj certa miro, ĉar ĉifoje ĝi aspektas pli bele – tiom, ke ni ne devas honti dum ĝia varba antaŭmeto por viaj amikoj.

Vere – dank` al oferemo de multaj sennomaj samideanoj, kiuj finance subtenis nin, ni ŝparis certan sumon kaj ni povas kuraĝi eldoni la unuan numeron kvankam prokraste, tamen pli lukse. Samtempe ni enmetas poŝtpagilon kun peto pri subteno; kvankam la estontaj restaj ĉijaraj numeroj aperos en malnova vesto, tamen la aspekto espereble estos pli kvalita kaj enhavo interesa, precipe per aperigo de elektitaj novaj leksikoj el „Suplemento“, nova leĝo de nia kara lingvo.

### SUPLEMENTO

estas aldono al Plena Ilustrita Vortaro, kiu aperis fine de la jubilea jaro 1987. Sur 45 samformataj paĝoj ĝi alportas kvanton da novaj terminoj kaj teknikaj kaj poeziaj. Kompilis ĝin franco Roland Levreaud kun kunlaborantoj kaj aprobis profesoro Gaston Waringhien.

### NOVÝ ROČNÍK

Vážení čtenáři,

berete do ruky první číslo nového ročníku našeho časopisu se smíšenými pocity a jistým údivem, protože tentokrát vypadá hezčí – natolik, že se nemusíme stydět, když je náborově předložíme svým přátelům.

Skutečně – díky obětavosti mnohých bezejmenných samideánů, kteří nás finančně podpořili, uspořili jsme jistou částku a můžeme se odvážit vydat první číslo, i když opožděně, kvalitněji. Současně vkládáme složenku s prosbou o podporu; i když budoucí zbývající letošní čísla se objeví ve starém šatu, doufejme, že vzhled bude přece jen kvalitnější a obsah zajímavý, zejména publikací nových vybraných výrazů ze „Suplementa“, nového zákona našeho drahého jazyka.

### SUPLEMENTO

je dodatkem k Plena Ilustrita Vortaro, který se objevil koncem jubilejního roku 1987. Na 45 stranách stejného formátu přináší množství nových technických i básnických termínů. Sebral je francouz Roland Levreaud se spolupracovníky a schválil profesor Gaston Waringhien.

Ĝi kribras multajn neologismoj, proponitaj kaj kolektitaj de Henri Vartré kaj kelkaj dekoj da ceteraj aŭtoroj. Ĝi baze regulos diskuton inter fundamentalistoj kaj tiuj, kiuj por poeziaj celoj volas disvatigi la vortan bazon. Elektitajn terminojn alportos sinsekve nia bulteno.

### BELAN DONACON

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto preparis opera ensemblo de la teatro de F.X.Ŝalda en Liberec la 30an de januaro 1988 en antaŭtagmeza matineo. Kantistoj de Nacia teatro en Prago kaj gastis niaj esperantaj artistoj Miroslav Smyčka, solisto de ŝtata opero en Ústí n.L. kaj Josef Vích, membro de Nacia Teatro en Prago, kiuj prezentis en la unua duono de la programo konatajn operariojn de la ĉeĥa opera verkaro en elstara traduko de Tomáš Pumpr kaj Rudolf Hromada. Unika interpreto de ambaŭ niaj artistoj faris ĉi tiun parton de la programo por ni – ĉeestantoj – neforgesebla. Ilia klara elparolmaniero sonigis puran Esperanton kaj estis eĉ unika propagando de Eo en ĉeestanta neesperanta parto de la teatra publiko (amikoj de la opero de la liberec-a teatro). Enkondukon al la koncerto en senerara Eo prelegis membro de teatra ensemblo Lubomír Tlalka. La tutan programon interese kaj sprite akompanis reĝisoro Oldřich Mrňák, kiu per populara klarigo proksimigis unuaopajn partojn de la programo al la publiko. El la dua parto de la programo, propra donaco de la libereca opero al la esperantista publiko kun unikaj kantistaj interpretoj, oni ne povas forgesi Blanka Černá en ario el Orfeo kaj Euridiko de K.W.Gluck, Maria Kremerová en Forto de la sorto de Giuseppe Verdi, Stanislav Dašek kiel Joutek en Halka de Moniuszko, Arnošt Klíma en Rondo el Faust de Gounod kaj ĉiujn aliajn samvalorajn prezentaĵojn. Suverene per fortepiano akompanis dirigento Boris Joneš kaj Jiřina Permanová.

Niajn sentojn bele esprimis Oldřich Mrňák en la fina vortoj, kiam li diris, ke ne nur Esperanto, sed ankaŭ la muziko estas ilo por internacia interkomprenigo.

Proséva tak noho neologismů, navržených a sebraných Henri Vatréem a několika desítkami ostatních autorů. Podstatně usměrní diskusi mezi fundamentalisty a těmi, kteří si pro básnické účely přejí rozšířit zásobu slov. Vybrané termíny postupně přinese naše VF.

### KRÁSNÝ DAR

K 100.jubileu esperanta pripravila opera Divadla F.X.Šaldy v Liberci dne 30. ledna 1988 dopolední matiné.

Zpívali sólisté Národního divadla v Praze a hostovali naši esperantští umělci Miroslav Smyčka, sólista státní opery v Ústí n/L a Josef Vích, člen opery národního divadla v Praze, kteří předvedli v první polovině programu slavné operní arie české operní tvorby ve vynikajícím překladu Tomáše Pumpra a Rudolfa Hromady. Vynikající interpretace obou našich umělců učinila tuto část programu pro nás přítomné nezapomenutelnou. Jejich jasná dikce dala zaznít čistému esperantu a byla i jedinečnou propagací esperanta u přítomné neesperantské části divadelního publika (přátelé opery libereckého divadla). Úvod ke koncertu v bezvadném esperantu proslovil člen činohry Lubomír Tlalka. Celý program poutavě a vtipně provázel režisér Oldřich Mrňák, který populárním výkladem přiblížil jednotlivé části programu publiku. Z druhé části programu, vlastnímu daru liberecké opery esperantskému publiku s jedinečnými pěveckými výkony nelze zapomenout na Blanku Černou v arii z Orfea a Euridiky od K.W.Gluczka, Marii Kremerovou v Síle osudu Giuseppe Verdiho, Stanislava Daška v Joutekovi z Moniuszkovy Halky, Arnošta Klímy Ronda z Gounodova Fausta a všech ostatních, stejně hodnotných vystoupení. Suverénně na klavír doprovázel dirigent Boris Joneš a Jiřina Permanová.

Naše pocity krásně vyjádřil Oldřich Mrňák v závěrečném slově, když řekl, že nejen esperanto, ale i hudba je mezinárodním dorozumívacím prostředkem.

Jiří KAREN, ĉeĥa kaj esperanta verkisto, debutis sub pseŭdonimo La Psiko en Leipzig-o dum IFER 87(foira renkontiĝo) per sia rakonto „La verda malsano“, prezentita de Rudolf Burmeister, el la libro „Hunda vivo kaj aliaj satiroj“. (Der Esperantist 387)

Jiří KAREN, ĉeský a esperantský spisovatel, debutoval pod pseudonymem La Psiko v Lipsku během IFER 87 (veletržní setkání) svojí povídkou „Zelená nemoc“ přednesenou Rudolfem Burmeisterem z knihy „Pší život a jiné satiry“. (Der Esperantist 387)

SANMARINA UNIVERSITATA SESIO pri MORFOSCIENCOJ okazos en Pollando-KRYNICA 1989 majo 2-8. Organizantoj: Akademio internacia de la sciencoj en San Marino kaj Pola Esperanto asocio, vojvodio filio en Krakovo. Vi povas studi Internacian lingvon sub gvido de akademianoj por atingi internacie prezentitan scion, komenci la vojon al internacia diplomo, akiri la sciencan gradon je dezirata kaj rajtigita nivelo. Vi povas ekstudi por bakalaŭriĝi, magistriĝi, doktoriĝi aŭ habilitiĝi en tiu ĉi Akademio Internacia de la Sciencistoj. Ĉijara aranĝo en Pollando helpas venki financajn barojn por partoprenontoj el socialismaj landoj. Prezo 10 000zl. Informoj, aliĝoj: Krakow, szkr. poczt. 519, PL 30-960 Krakow 1 Pollando. Atingo de universitata diplomo sub kondiĉo de maturec-ekzameno kaj kelkjara studo sub gvido la lektoroj de Akademio Internacia en San Marino.

XI-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro ITREE 88-10-1 ĝis 6 en Antonshöhe, GDR. Loĝado en 2-4 litaj ĉambroj, ĉiutagaj ekskursoj, aŭtobusa ekskurso, manĝo 3x tage, vesperaj kulturprogramoj – prezo tre favora=190,-markoj. Aliĝoj senescepte ĝis 88-08-01! Organizanto: Rudolfo Eichler, Hermann-Matern-Str.21, DDR-9430-Schwarzenberg.

XI-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj v Krušných Horách. ITREE. 1-6.10.1988 v Antonshöhe, NDR. Ubytování ve 2-4 lůžkových pokojích, denně výlety, autobusový zájezd, jídlo 3x denně, večerní kulturní programy – výhodná cena 190.-M! Přihlášky bez výjimky do 88-08-1! Organizátor: Rudolf Eichler, Hermann-Matern-str.21, 9430-Schwarzenberg.

AEST – Konferenco de sciencteknika sekcio de Slovaka EA – 88-08-3 ĝis 5. Temo: Raciigo en scienco kaj tekniko. POPRAD. Komputiloj. Prognostiko. Terminologio. - Partoprenkotizo 150 Kčs. Tranokto hotela 60 Kčs tage, turisma a` 35 Kčs. Manĝado por 3 tagoj 150 Kčs. Post la konferenco okazos tradiciaj turismaj tagoj en Žilina (88-08-6.-12). Korespondadreso: Ing. Juraj Britka, Velká Okružná 28, CS-010 01 Žilina. Aliĝiloj ĝis 88-06-15.

AEST – Konference vědeckotechnické sekce SEZ, 88-08-3 až 5. Téma: Racionalizace ve vědě a technice. POPRAD. Komputery. Prognostika. Terminologie. - Účast. poplatek 150.-Kčs. Nocleh: hotelový 60.-Kčs denně, turistický: 35.-Kčs. Třídenní stravování 150 Kčs. Po konferenci budou: tradiční turistické dny v Žilině (88-08-6.-12). Adresa: Juraj Britka, Velká Okružná 28, CS-010 01 Žilina. Přihlášky do 88-06-15.

ĈIUJN FORTOJN POR NIA ASOCIO! ĈU VI JAM ALIĜIS? NOVA AKTIVADO EN ĈIUJ SEKCIOJ! Membrokotizo 60.-Kĉs jare. ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

VŠECHNY SÍLY NAŠEMU SVAZU! UŽ JSTE SE PŘIHLÁSILI? NOVÁ AKTIVITA VE VŠECH SEKCÍCH! Členství 60 Kčs ročně. ČES, Jilská 10, PRAHA 1

BULGARIO. En Bulgara Esperantisto 1/88 aperis listo da ĉijaraj esp. renkontiĝoj, elinter kiuj multaj povus interesi nian samideanaron. Precipe por junularo konvenas tradiciaj laborbrigadoj (1.-27.VIII. Pleven organizita de E-societo „Eterna amikeco“ Pleven – kaj – inter 1.-20.VIII. Sadievo org. de Societo „Nigra maro“ samloke). Ili estas tre popularaj, ĉar la junularo ne bezonas pagi kaj salajras iom da mono, kiu estas kune parte elspezita per kunaj ekskursoj kaj aliaj aranĝoj. Petru informoj ĉe organizantoj. Elinter aliaj renkontiĝoj ni elektis: 13-23.VII. E-a turista marŝo Pirinmontaro org. E-societo „Esperanto Triumfonta“ – Internacia Danuba Remado (dunajská plavba 17-31.VIII org. *Turista* sekcio de BEA Internaciaj E-kursoj por instruistoj 10-30.VIII. *Piwanica* de Instrukomisiono de BEA – Terminologia seminario esperantista 2. - 8. IX. Pisanica de TEC + instrukomisiono de BEA – Seminario-ripozo kun internacia partopreno „Tra arbaroj kaj kampoj“ 18-28.IX. Velingrad de E-societo „St.Kalpazanov“ Velingrad – Turistaj E-tagoj kaj festo de montodomo „Esperanto“ 9-12.VI. Sofio de Turista sekcio de BEA – Sakfestivalo „Targoviŝte-88“ 15-24.VII, de E-societo „Verda eskadrono“, Targoviŝte – Via Internacia Somera E-universitato 16-22.VII. Veliko Tarnovo, E-societo „Lumo“, Veliko Tarnovo Turista marŝo en Pirin-montaro 15-29.VII. Pirin-montaro org. Turista E-societo „Edelvejso“ Pleven – Entute anoncis Bulgara Esperanto Asocio 61 renkontiĝojn ĉijarajn! Precizajn informojn, prezojn ĉe BEA *Bulgaro* Ĥristo Botev 9, BG-1303 Sofio, Bulgario.

○

Konkurso de MONDA TURISMO – 1988: La temo konsistas el du demandoj:

1. Kiel instigi *funkciulojn*, oficistojn, deĵorantojn, vojaĝgvidantojn, ĉiĉeronojn kaj aliajn laborulojn de la internacia turismo lerni Esperanton? - 2. Per kio mi mem kontribuos al tiu ĉi agado? - Limdato por alveno de konkursaĵoj (respondoj de ambaŭ demandoj) en du tajpitaj (=maŝinskribitaj) ekzempleroj: 30.IX.88. Adreso: MONDA TURISMO, ul. M.Sklodowskiej 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. Premio: Senpaga partopreno en Esperanta internacia aranĝo.

○

ARTA SEMAJNO 8.15.5.1988 en Halle/GDR. Internacia arta metiejo en Halle. La aranĝo celas bone parolantajn esperantistojn, precipe junajn, kiuj interesiĝas pri diversaj ĝenroj de la arto kaj kiuj volas pliperfektigi kaj internacie interŝanĝi spertojn. Riĉa socia programo. Partoprenkotizo 280,-M. Inkluzivas manĝadon kaj tranoktadon. Aliĝoj: Kulturverband der DDR, Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Halle, PSF 161, DDR-4010 HALLE, GDR.

○

XIa Ĉebalta Esperantista Printempo Mielno-Koszalin 29.V.-4.VI.1988 Tutsemajna ripozo ĉemara. Plialtigado de lingvonivelo. Ekkono de turismaj kaj kulturaj valoroj de Meza Pomoranio. Loĝado en la *Internulejo* de Medicinista Instru-centro en Koszalin, Aleja Zawadzkiego 9. Prezo 4490 zł (laŭ nova kurso). Matenmanĝojn kaj vespermanĝojn oni devas pagi aparte (ĉirkaŭ 300 zł tage). Aliĝojn: Koszalinске towarzystwo Społeczno-Kulturalne, ul. Zwyciestwa 126, PL-75-950 Koszalin, Polska

○

Esperantista klubo KASS, poŝtkesto 190, 46621 Jablonec n/N – ne elĉerpas sian aktivecon post „printempa paca renkontiĝo“ en Kabano Nad Prosečí 23.IV. (vidu informojn en la lasta VF) kaj daŭrigos la aktivecon dum majaj klubaj kunvenoj ĉiulunde je la 19a horo: 2.V.: Interesaĵoj el E-gazetaro – referas s-ano Hilebrand, - 14.V.: Esperantista movado en venonta jarcento = Zdeněk Rezáč – 23.V. Libertempaj migradoj en Rumanio, diapozitivaj-rememoroj – s-ano Jíra – 30.V. Informoj el la CK de ĈEA – s-ano Josef Novák. Kunvenejo „Dům vzdělávání KaSS, 3-a etaĝo, kiu situas apud teatro, proksime de urbocentro Jablonec n/N.

WARINGHIEN: Nek cedi, nek koncedi al la „praga skolo“

En „Literatura Forio“ n-ro 190 (Svislando) aperis intervjuo fare de Giorgio Silver, kiu okazis dum SAT kongreso en Bulonjo sur Maro, kun profesoro Gaston Waringhien, kompilanto kaj ĉefredaktoro de PIV (Plena Ilustrita Vortaro), kiu depost la 1970 jaro fariĝis aprobata leĝo de esperanta terminologio. La senco de la intervjuo estis publikigi opinion de G.W. pri inundo da neologismoj, kiuj aperis dum lasta tempo en „Neologisma glosaro“ de Vatré, ĉe diversaj aŭtoroj kaj ankaŭ ĉe niaj poetoj, nomitaj „praga skolo“. Fine oni komentaris aperon de t.n. Suplemento de PIV, kiu okazis 18 jarojn post apero de PIC, eldonita denove de SAT en Parizo. El la interparolo kun la ĉefredaktoro ni elektas kelkajn ideojn:

(pri enhavo de Suplemento): „Vi trovos precipe teknikajn vortojn, ĉar en tiuj dudek jaroj la tekniko terure evoluis. El beletristika vidpunkto mi elmetis kelkajn, sed malmulte. Mi ne estas kontraŭ la neologismoj, sed oni devas kutimigi la homojn, kaj oni ne povas kiel iuj faras, enmeti dek aŭ dek du neologismoj sur unu paĝon: la homoj forĵetos la libron! (La reformemuloj) ĉiam citas la verkojn de Kalocsay, sed kiam oni rigardis lin, oni vidas, ke en unu paĝo estas unu, maksimume du neologismoj.

(Pri diferenco inter Kalocsay kaj ĉi tiuj epigonoj). Kalocsay inventis mem la neologismoj. Li ĉerpis el jam ekzistanta lingva materialo. Vi certe konas la duan eldonon de la NEOLOGISMA GLOSARO de Vatré. Mi skribis al Henri Vatré pri tio, kaj mi riproĉis, ke li ne indikas la nombron de ripetoj inter la dokumentoj. Li tiam donis al mi la ciferojn: estas apenaŭ ok procentoj de neologismoj, kiu troviĝas dufoje en la dokumentoj, neniuj pli ol dufoje, do 92% nur unufoje!

(Pri leksika evoluo de la lingvo). Preskaŭ nur sur la teknika tereno aperis novaĵoj. Sur la propra literatura aŭ konversacia mi mi rimarkis tre malmulte da ŝanĝoj. Ekzemple kaseto/kazedo: ili insistis pri kazedo, do mi enmetis kazedon. Ĝi estas apenaŭ teknika vorto, ĉar ofte uzata en ordinara konversacio. Mi fakte ne vidis neceson enmeti multe da neologismoj ĉar efektive, krom Fernando de Diego kaj Reinhard Haupental (mi ne parolas pri Piĉ, kiu estas tute ĥimera – persona fantazio, simple), el ili tre malmulte aperis en alies publikigaĵoj ... (ĉe teknikaj vortoj) estis la plej granda malfacilaĵo elekti inter du proponoj de teknikaj fakuloj. Tio estas regno de scienco kaj ne de literaturo. Do mi enmetis varianton, dirante, ke oni trovas ankaŭ tiun formon: ni lasu al la uzado la solvon, ĉu ne?

(Pri kunlaborantoj de Suplemento) Vere la ĉefa kunlaboranto estas Roland Levreaud. Tion atestas cetera la antaŭparolo al la nova PIV, subskribita de niaj du nomoj. Mi jam delonge esperis, ke Duc Gonidaz akceptus kunlabori, sed li havas aliajn interesojn aŭ li ne havas tempon, mi ne scias ... Ne estas facile trovi kunlaborantojn taŭgajn: sed povas ankaŭ aperi tute nekonata homo: en Germanujo ekzemple Krause, kies leksikografia laboro estas bona, malgraŭ la kritikoj de Haupental.

(Pri prilaboro de specifaj, sciencaj aŭ teknikaj terminoj). Pri la afero okupiĝis precipe Roland Levreaud, prezidanto de Franca E-instituto. Mi mem ne havis plu la tempon, kaj la forton, por diskuti koresponde kun la diversaj fakuloj. Helmar Frank el Paderborno estis la plej grava kunlaboranto de Levreaud pri tio ...

KLUBO DE ESPERANTISTOJ EN PRAGO,  
pk 1069, 11121 Praha 1 fondis turisman fakon,  
kiu preparis turisman konkurson 1988. Informoj  
Rudolf Pleskot, 130 00 Praha 3, Kalininova 83.

KLUB ESPERANTISTŮ V PRAZE, p.schr.  
1069, 11121 Praha 1 založil turistickou sekci,  
která připravila t. Soutěž 1988. Informace  
Rudolf Pleskot, 130 00 Praha 3, Kalininova 83.

Kelkaj novaj terminoj elektitaj el Suplemento de PIV – 1987

acido ribonukleata

advers/a = kontraŭbatalanta

aides/o = AIDS, „Akirita imunodeficita sindromo

albergo = kampara hotelo

alternativ/o = propono de alia solvo ol la kutima  
/ekz. ekolog./

analog/a = / informadika/

atlant/o = dua nuka vertebro

aŭstralopitek/o

avers/o = dorsoflanko

balz/o = trafika signilo

barjon/o = klaso de jonoj

basketbal/o

bias/o = elektronika termino

binar/a = duaria / informadiko

biocenozo = tuto de organismoj ligitaj al unu  
biotopo

biomas/o = kvanto da vivanta materio en unu  
difinita spaco kaj tempo

biosfer/o = tuto de vivantaj estaĵoj, ĉirkaŭantaj la  
teran globon

biotop/o = difinita vivmedio entenanta ĉiuspecajn  
organismojn

bit/o = binara cifero /informadiko/

bitnik/o = ribelanta junulo kontraŭ buĝa socio,  
marĝene vivanta

blat/o = duonpreta duonkondukaĵo

bob/o = sporta sledo

bosnov/o = brazila dancmuziko

burg/o = mezepoka fortigita kastelo

butik/o = memserva

ĉambr/o = vivoĉambr/o = hejma salono de malgranda  
loĝejo

ĉar/o, butikuma puŝĉaret/o = ĉareto aŭ sako muntita  
sur veturigabla framo

cimitar/o = araba glavo

ĉip/a = malmultekosta

ĉip/o = blato / insekto

ĉister/o = Kapto/batilo uzata en vaska peloto  
/pilkludo/

ĉistron/o = sinonimo de geno, kodono

**Daŭrigota**

Esperantista kolonieto „Verda Familio“ invitas al senkosta daŭra logado en vilaĝaj dometoj ku ĝardenoj 10-15 unuopulojn, resp. 5-6 geedzaj paroj, kiuj simpatias kun sana naturkomforma, senvianda, reformita vivmaniero. Oni pagos nur por la elektra energio, hejtado, imposto kaj asekuro, do nenian lupagon. Informoj Ernesto Váňa, 962 71 Dudince

Esperantské sídliště „Verda Familio“ Vás zve k trvalému bezplatnému pobytu ve venkovských domcích se zahradou, 10-15 jednotlivců, ev. 5-6 manželských párů sympatizujících se zdravým přírodním, bezmasým, reformním životem. Platí se jen za elektřinu, topení, daň a pojištění, tedy žádné nájemné. Informace Ernest Váňa, 962 71 Dudince

NOVAJ FINSTUDINTOJ DE LA BAZA KORESPONDA KURSO – LEKTORO DRO HRADIL

Zajíčková Jiřina

Pínová Beatrix

Nováková Irena

Stránská Alena

Cejpek Jiří

Sedláčková Vladimíra

Vodná Zdeňka

Bílý Vladimír

Simandlová Marie

De lektoro ING. KOČVARA:

Nedbalová J.

KORAN BONDEZIRON al ilia nova pormovada vivo! Gesamideanoj helpu al ili!

Ivo LAPENNA, estinta longjara prezidanto de UEA forpasis je zamenhofa tago la 15an de decembro 1987 en Kopenhágeno en la aĝo de 78 jaroj. Kvankam post Uko 1974 la vojoj de UEA prof. Lapenna disiriĝis, liaj meritoj por disvastigo de Eo estas neforgeseblaj kaj la centra organo de Eo dediĉis februaran numeron al lia omaĝo.

Eo rondeto en Benešov u Prahy festis sian 5-jaran datrevenon de sia fondiĝo dum solenaĵo la 5an de marto. La klubo sub vigla gvidado de s-ano Václav Stibůrek atingis multajn sukcesojn kaj ariĝis 32 membrojn. Ili akceptu nian koran bondeziron!

Kelkaj anoncitaj esperantaj renkontiĝoj 1988/elekto:

Printempa esperantista paca renkontiĝo Chata nad Prosečí u Jablonce n/N kun pacmarŝo 23.IV. - programo amuza, tranokto. E-klub ps. 190, 46621 JN

Pražské mládežnické setkání JUSETUR 19-22.V. Junulara sekcio de ĈEA

Dálkový pochod Pardubice-Ležáky 25+26.VI. - Milada Hemerková, Wolkerova 2071, 530 02 Pardubice

Letná škola E-a SEL 88 2.-15.VII. A 16-29 VII en Poprad. Inf: Slovenský esperantský zväz, Sobotské nám 6, 05801 Poprad

Somera E-tendaro Lančov, a` 14 dní do 3.VII a 31.VII. 950.- Kčs. Inf. Esperantský klub 674 01 Třebíč

Turisma semajno – TUSE 88 en Slovaka paradizo, 16.-22.VII. Inf: Peter Pavúk, Jilemnického 17/9, 052 01 Spišská N. Ves

Somera feriado sub altaj Tatroj, 4 etapoj turismaj, 4.-10.VIII, 11-17.VIII, 8.-14.IX.kaj 15.-21.IX 88 Inf: SEZ, vidu supre

Turismaj tagoj en Žilina, TUTA 88, 6.-12.8.1988. Inf: Ing. Juraj Gondžúr, Levočská 3, 01008 Žilina !por 100personoj!

Aplikácie esperanta vo vede a technike AEST 88 2.-5. 88 Poprad. 100 personoj. Inf: Ing. Juraj Britka Velká Okružná 28, 01008 Žilina

Esperantský kulturní festival 17.+18.9.1988, E-kroužek Ostroj Opava, Na rybníčku 41. 741 01 Opava. Jam tradicia kultura aranĝo

Ekologia seminario, septembro en Prago – antaŭita informo, Junulara sekcio de ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1

Konferenco de fervojista sekcio en Valtice, suda Moravio, 30.IX-2.X. turisma programo, gastoj bonvenigitaj. Sekce železničářů ČES Praha

IMUS hudební seminář, Praha 16.-18.9. Junulara sekcio de ĈEA

Ŝak.turneo SIZ, 10+11. 9.88 Žilina, 30 personoj, Inf: M.Salát 02341 Žilina

Feriaro ĉe adriatika maro, malmultekosta en bela medio, 100m de la maro. Davor GRGAT, Paičeva 21, tel: 058/512-565, 580 00 Split, YU /

LENTAIGNE: KIEL DIRI? (Daŭrigo). Temo: EDZ/IN/O Edziĝi. Edziniĝi. Li edzinigis ŝin al si kontraŭ la volo de ŝia patro. Ili geedziĝis sekrete. Edziĝo pro (el) inklino, mono, intereso, laŭ koro. Edziĝo estas loterio. Edziĝpova. Edziniĝmatura knabino. Provedziĝo. Deklaro pri edziĝo. Civila edziĝo. Interkonfesia edzeco. Edziga promeso., formulo, ringo, ceremonio. Publikiĝi edziĝanoncon. Akto de edziĝo. Redakti oficialan akton. Nupto. Edziĝfesta procesio. Edziĝa soleno. Novedzino. Deflori. Kiel edzinon, ŝi donis sin al li. Edziĝvojaĝo. Mielmonato. Miela tempo. Edzece feliĉa. Ligita por la vivo. Blanka edziĝo. Virta (ctnostná) senriproĉa edzino. Tiu edzo estas vera perlo. Li sentis veran kultron por sia edzino. Edzo kaj edzino estas nur unu. Ili geedziĝis kaj kunvivis feliĉaj por ĉiam (Fino de fabeloj). Ora edziĝo (post 50 jaroj). Nupta jubileo. Rapida edziĝo, porĉiama kateniĝo. Edza potenco. Stato de virino. Postulema virino. Kial venis al li en la kapon esti ĵaluza pri sia edzino? (ĵaluza kiel tigro). La edzino faris scenon (akrajn riproĉojn) al la edzo. Submetiĝo, senfina cedado al la edzino. Hejme la virino sinjoras, mastras (sed ankaŭ: mastrumas). Konduki lin je la nazo. Li estas sub la ŝuo de sia edzino. Kun edzo plej malmola estas pli bone ol sola.

Korespondi deziras: Mallongigoj-zkratky/: bk=bildkartoj, ĉl=ĉiu lando, ĉt=ĉiu temo, d=deziras, iŝ=interŝanĝi, its=interesiĝas, jj=jaroj, kol=kolektas, k=korespondi, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, tm=tuta mondo

Helmuth Eschen, Helsinker str.83, DDR-1703 Rostock-42, GDR, d k ĉt ĉl

Zhang Shoucai, Zunvi Dong Lu 27, Jihua Gong Si, Jiangbei, Ĉinio, 54-j, tradukisto d k pri pm bk, fotado

Jan Ulfik, Aleja kwiatow 1/17, PL-42-606 Tarnowskie Gòry, Poland, d iŝ pm, bankbiletojn, monerojn tm

Jakvo Qstigi, p.s.aIvberv. Esperanto-Ligo, 585-4e rue, Iberville, Qc Kanado, J2X 3M9 eldonisto de maskuto/kebekujo d k pri orgena muziko

Andrzej Grabski kaj Dariusz Olewinski, szkr.poczt.26, PL-48-300 Nysa, Pollando, d k kun junaj samideanoj

Amika Mez-inzula klubo de Esperanto, Sita 66, C9,R.R.2 Lantzville, B.C. Vor 2110 Kanado – nova klubo serĉas korespondamikoj tm

Malsamaĝaj gelernantoj de Pernambuka Esperanto-Asocio, Caixa postal 1139, 50001 Recife-PE Brazilo d iŝ bk pm bankbiletoj, E-libroj

Sleonjov Vladislav, 440040 Volgograd 40, Sozidatelskaja 4-22; d k pri E-movado sporto turismo moderna muziko

D-ro Akwasi Owasi OSEI, Komfo Anakye Teaching hospital,P.O.B.1934,Kumasi, Ganao d k ĉt tm

L.I.Medvedev, 43000 Odi Bncovo 3 Moskovskoj alja 101, USSR, komencantoj de mezlerneja grupo d k ĉt tm

Gloria Barry, Exchange Lots, Couva, Trinidad, Wastindia, 24j instruistino de muziko d k tm

E-klubo OAZO, 656015 Barnaul,a.k.822,USSR,13-48j komencantoj d k tm

S-ino Margaret Parker, Dubai Equestrian Centre, P.O.B.293. Dubai, Unuiĝintaj arabaj emiratoj, d k pri kvakerismo

S-ro Algirdas Mazuika, Lithuania, 235408 Šiauliai, Žalgirio 6-5, USSR, ĉt

La Bron Bynun, 1006 S.W.th6 No9, Anadarko OK 73005 USA, 40j pri sekretoj de nia planedo, NIFO-j, sciencifikcio.

OKP 6 Liberec

xmxxmxmxmxmxmx  
xmxxmxmxmxmxmx  
xmxxmxmxmx  
xmxxmxmx  
xmxxmx  
xmxx  
x

Esperantský klub  
295 01 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka  
Imprimé 50%  
Presaĵo